Protokolo de la estrarkunsido de la 23a de novembro 2010

Federacio EDE

Skajpe de la 21a ghis la 22a15

partoprenantoj:

- Bertrand HUGON : prezidanto
- Eŭgen MACKO : vic-prezidanto, konsilisto pri Germanujo kaj orientaj landoj
- Fabien TSCHUDY : sekretario
- Elisabeth BARBAY : vic-sekratario

Bert SCHUMANN, kasisto, konsilisto pri internaciiĝo kaj retejo, ne cheestis  pro privata kialo.

## Tagordo


1 Politika programo....2
  1.1 Nuna stato....2
  1.2 Kiel pluevoluigi....2
2 Statuto....2
3 Raportoj....2
  3.1 Pri Alsoors....2
  3.2 Somera universitato....2
4 Ghenerala asembleo....2
  4.1 Financa raporto....3
  4.2 Morala raporto....3
  4.3 Nomumo de novaj konsilianoj....3
  4.4 Baloto de nova estraro....3
  4.5 Vochdono pri la politika programo....3
  4.6 Vochdono pri statuto....3
5 Varbilo....3
6 Venonta estrar-skajpumado....3


La decidoj blue skribitaj estis vochdonitaj

# 1 Politika programo

## *1.1 Nuna stato*

La opinisondo ne estis tre populara en la senco, ke nur 7 konsilianoj el 13 vochdonis kaj 2 blanke vochdonis. Shajne la vochdonproceduro estis tro komplika.

Poste Renato shanghis sian proponon surbaze de:

- la rezulto de la opnisondo;
- rimarkoj de Bertrand, Guillem kaj Eugen.

Li cetere aldonis frazon pri ekologio. Bertrand sendis al la estrara listo la nunan proponon.

## *1.2 Kiel pluevoluigi*

Char la Condorcet-metodo estas komplika kiam temas pri paragrafoj, ekde nun ni vochdonigos la konsilion pri la tuta programo kun la nura demando: chu vi aprobas tiun programon ? Eblos respondi « jes », « ne » au « sindetenas ».

Fabien atentigu la konsilianojn pri la venonta skajpumado dedichota al la politika programo. Ideale partoprenu almenau po unu reprezentanto sekcie. Se la dato de la 8a de decembro ne taugas por tiu celo, tiam interkonsenti pri alia dato.

Kiam la programo havos sufiche da subtenantoj en la konsilio tiam ghi estos preta pro proponighi al la membroj.

Kion ni komprenas per « sufiche da subtenantoj » ? Chu duono, chu tri kvinonon, chu kvar kvinonoj de la konsilio. Pri tio la estraro decidu en sia venonta virtuala kunsido.

# 2 Statuto

Bertrand sendu proponon al la estraro en la 28a de novembro.

# 3 Raportoj

## *3.1 Pri Alsoors*

Fabien publiku ghin (inter alie) che ede-eu.

## *3.2 Somera universitato*

Elizabet nun ne havas tempon por esperantlingve resumi la raporton de Marcelle.

# 4 Ghenerala asembleo

Ni bezonos helpon almenau de la franca sekcio por traduki kaj chefe sendi vochdon- kaj inform-materialon al franclingvanoj. Tiu helpo estos petata en la 4a au 5a de decembro en Parizo.

## *4.1 Financa raporto*

Normale ghi devus esti mallonga char estas malmulte da enspezoj kaj elspezoj.

## *4.2 Morala raporto*

Ghi estu mallonga char ghi devos esti tradukata almenau al la franca.

## *4.3 Nomumo de novaj konsilianoj*

Bertrand sendu retmesaghon al la prezidantoj de la sekcioj, ke ili nomumu siajn reprezentantojn por la venonta mandato.

## *4.4 Baloto de nova estraro*

La estraranoj jam pripensu individue chu ili volas rekandidatighi.

## *4.5 Vochdono pri la politika programo*

## *4.6 Vochdono pri statuto*

# 5 Varbilo

Pluraj paghoj de la sespagha varbilo tute ne estas pretaj. Ni do faru aliel por havi ion pretan decembre. Du eblecoj:

- uzi varbilon de antaua jaro: Bertrand petu ghin che Emmanuel Debanne;
- fari A5 flugfolion kun la teksto de Eugen unuflanke, kaj la alighilon aliflanke.

Ni plutraktu la aferon retposhte.

# 6 Venonta estrar-skajpumado

Jhaudon, la 16an de decembro je la 21a15.